

4/2019

Julio
Aŭgusto

ISSN 0032-2431

Pola Esperantisto

Revuo de Pola Esperanto-Asocio



- ☆ Nacia Legado 2019
- ☆ Kontraŭ senkonscia toksomanio
- ☆ Porinfana desegnokonkurso "Pollando Miaokule"

Pola Esperantisto

Dumonata revuo de Pola Esperanto-Asocio. Fondita en 1908.

Eldonanto

Pola Esperanto-Asocio
ul. Gen. W. Andersa 37/59 a
00-159 Warszawa
<http://www.esperanto.pl>

Ĉefredaktoro

Robert Kamiński, rk-lodz@wp.pl

Kunlaboro

T. Nemere, M. Tatar,
A. Wilkus,

ABONOJ

La abono por 2019 - por 6 numeroj (papera):

Pollando - 50 zlotoj
eksterlando - 20 eŭroj
Cifereca (pdf)
Pollando - 25 zlotoj
eksterlando - 10 eŭroj

Pagendaj al la konto:

PL 37 2130 0004 2001 0558 6110 0002
swift INGBPPLPW

La mendon provizu per informo, al kiu
adreso estu sendata la revuo.

ATENTO

Abonoj per eŭroj validas post
aldono de bankaj kostoj.

Polan Esperantiston eblas aboni per

Konto de PEA en UEA: peaa-v;

Detaloj troviĝas ĉe:

<https://uea.org/alighoj/pagmanieroj>

kaj <https://uea.org/alighoj/spagilo>

Presejo

BŁĘKITNE STUDIO

ul. Chopina 6, 44-100 Gliwice

Estraro de PEA

Robert Kamiński - prezidanto
Agnieszka Mozer - vicprezidanto
Zofia Śmistek - sekretario
Alina Mozer - kasisto
Marek Mazurkiewicz - estrarano

Ĉefdelegito de UEA

Stanisław Mandrak:
stanislaw.mandrak@gmail.com

Peranto de UEA

Jan Skonieczka: jaskon@op.pl,

Pri la skribitaj artikoloj
respondecas
la aŭtoroj mem.
Ricevitajn manuskriptojn
oni ne resendadas.
La redakcio rezervas al si
la rajton mallongigi
kaj korekti la tekstojn.
Reprezo kaj tradukoj nur
kun indiko pri la fonto



Pola Esperanto-Asocio
Polski Związek Esperantystów

Fronta kovrilpaĝo - Benia - Bernarda Wiewiórska el Szczecin

Enhavo

Redaktoraj vortoj	2
Estraro informas	
<i>Robert Kamiński</i> , Eldonado de “Pola Esperantisto”	3
Eventoj	
<i>Lee Jungkee</i> , Agrabla restado en Bydgoszcz kaj Toruń	3
<i>Grażyna Szubryczyńska</i> , Porinfana desegnokonkurso „Pollando miaokule”	7
<i>Małgorzata Komarnicka</i> , La 5-a internacia simpozio	9
Mojose	
<i>www.pej.pl</i> , JES en Karłów	11
Raportoj, rakontoj	
<i>Revuo “Esperanto”</i> , Diplomo pri Elstara Agado	12
<i>Robert Kamiński</i> , Koresponda servo universala	14
Pri kio ni aŭdas	
{ <i>dzienniknaukowy.pl</i> }, Fizikistoj malkovris tiel fortan reagon, ke ili timis.... ..	15
<i>GeekWeek.pl</i> , Sukcesa flugo de la potenca raketo <i>Falcon Heavy</i>	16
Vizitindaj lokoj	
<i>Robert Kamiński</i> , La unua en Pollando, observa turo, en branĉaro de arboj	18
Homoj	
<i>Lidia Żychlińska</i> , Memorinda Tadeusz Kopec	20
Lingvosciencia angulo	
<i>Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko</i> , „La” ĉe propraj nomoj Aliaj difinoj - 1.....	21
Literaturaĵoj	
<i>Robert Kamiński</i> , Nacia Legado 2019	23
<i>Maria Konopnicka</i> , „Fumo” - fragmento	24
Saĝulaj pensoj	
<i>Andreo Bach</i> , Kontraŭ senkonscia toksomanio	26
Leterkesto	
<i>BES</i> , Literatura konkurso en Bjalistoko	28
<i>Adam Wilkus</i> , Interesa artikolo pri lingvoj	28
<i>Ret-Info</i> , Sveda ministro salutas la kongreson en flua Esperanto!	29
Kalendaro	30
Oni eldonis	
„Dziadek który jest wnukiem”, „Słownik idiomów Vortaro de idiomaĵoj”	32
Forpasis	
Tadeusz Kopec	33
El fotogalerio de Andrzej Sochacki	
<i>Andrzej Sochacki</i> , Programkonferenco en Maków Podhalański 1987	33



Kara legantoj

Ĉi-somere estas tre varme. La temperaturo altiĝas tiel, kiel pasintjare, dum la monda kongreso en Lisbono. Ĉiuj songas pri la fino de la nuna somero kaj pri reveno al “normalaj” temperaturoj. Ni aŭdas pri la venontaj ciklonoj, minacantaj Nordamerikon kaj Japanion. Evidenta klimatsanĝo fariĝas pli sentebla Glaciejoj fandiĝas kaj Gronlando fariĝas vere verda lando.

Ĉu modernaj teknologioj, pri kiuj ni tiel fieras, protektos nin kontraŭ katastrofoj? Aŭ, male, la uzo de ĉi tiuj teknologioj kaŭzas ĉi tiujn ŝanĝojn? Kiel ĉiam, oni povas konstati post jaroj kaj ni esperu, ke niaj konkludoj ne estos tro malĝojaj.

Mi esperas, ke la venontjara vojaĝo al Universala Kongreso kaj ILEI-kongreso en Kanado ne estos haltigita per alia atlantika tajfuno.

La somero malrapide finiĝas kaj finiĝas la plej grandaj ĉi-jaraj Esperanto-renkontiĝoj. Finiĝis la Universala Kongreso en Lahti. Monda Esperantujo havas novan estraron. Ĉu ĝi kaŭzos ŝanĝojn por nia movado? Ni vidos.

Ni revenu al nia pola Esperantujo kaj al Pola Esperantisto. Provante nuligi malfruiĝon de la eldonado, ni decidis fermi kajeron pli rapide. En la rubriko pri eventoj, vi trovos du artikolojn priskribantaj interesan eventon en Toruń.

Andrzej Bach revenas sur niajn paĝojn kun la nova, interesa artikolo. Ni ankaŭ informas pri la ĉijara „Nacia Legado”, al kiu aliĝas esperantistoj. Kiel antaŭe, la ĉefaj iniciatantoj de la partopreno de esperantistoj en ĉi tiu evento estas nia konataj tradukistoj Tomasz Chmielik, Lidia Ligeża kaj Bjalistoka Esperanto-Societo, kiuj plej realigas eldonadon de pola kaj eksterlanda literaturo en tradukoj al Esperanto. Okaze de la ĉijara „Nacia Legado”, ni prezentas la komenca fragmenton de la novelo "Fumo" de Maria Konopnicka, kiu ofte kortuŝis nin en nia junaĝo. Ni ankaŭ prezentas novaĵon en turismo - konstruadon de originalaj padoj kaj observaj turoj en la branĉaro de arboj. La unua tia instalaĵo estas jam konstruita en Pollando.

La redakta teamo de PE deziras al al ĉiuj bonan legadon.

Robert Kamiński

Estraro informas

Robert Kamiński

Eldonado de “Pola Esperantisto”

Ĉefa Estraro de PEA, post kunsido la 18-an de aŭgusto 2019, rememorigas, ke antaŭpagojn, por abono de “Pola Esperantisto”, akceptas la kasisitino de PEA – Alina Mozer en Varsovio. Pri kontaktoj kun presejo “Błękinie Studio” en Gliwice kaj sendado de la revuo al abonatoj zorgas Aleksander Zdechlik en Zabrze. En aŭgusto 2019, estas 70 abonantoj de PE en la papera formo kaj 11 en la cifereca. La redakcio sendas ankaŭ 16 senpagaj, devigaj ekzemplerojn al 14 la plej grandaj polaj bibliotekoj, 3 ekzemplerojn al Esperantaj bibliotekoj kaj ĉirkaŭ 10-15 al aŭtoroj. La nuna eldonkvanto de “Pola Esperantisto” estas 120 ekzempleroj. Nombro de abonatoj, jaro post jaro, kreskas.

Eventoj

Lee Jungkee (Ŝlosilo), Koreio

Agrabla restado en Bydgoszcz kaj Toruń

Post UK en Lahti, kun tri koreaj esperantistoj, de la 30-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2019, mi vizitis du urbojn - Bydgoszcz kaj Toruń en Pollando. Kompreneble, la vojaĝo en la fremdaj urboj bone sukcesis, dank'al la lokaj esperantistoj. La 30-an de julio, mi estis bonvenigita de s-ro Jan Skonieczka, la prezidanto de Esperanto Asocio en Bydgoszcz. La 31-an de julio mi vizitis tombon de la forpasinta samideano s-ro Andrzej Grzębowski, kiu estas fame konata esperantisto kiel profesia Esperanto-turisto, kies kompanio estis nomata „Esperanto-Tur”. Abrupte li mortis en la jaro 2014, en la kongresejo de la 99-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Bonaero, Argentino. Delonge mi amikiĝis kun li kaj klare mi memoris, ke li loĝis en Bydgoszcz. Tial mi decidis viziti la urbon survoje al Toruń.



Torunaj esperantistinoj kun koreaj gastoj en Ciechocinek.

Akompanate de s-ro Jan mi vizitis la tombejon kun bukedo, por esprimi mian profundan kondolencon, kiel iama amiko de Andreo. Sur lia tombŝtono estas gravuritaj jenaj vortoj en Esperanto: "Ripozu en paco". Tage mi renkontis plurajn samideanojn, kiuj loĝas en Bydgoszcz. Inter ili, kun ĝojo, mi rerenkontiĝis kun mia malnova amiko d-ro Przemek Grzybowski, kiun mi renkontis antaŭ 30 jaroj, en la Esperanto-Kastelo Greziljono, en Francio. Vere Esperantujo estas malgranda! Posttagmeze, kun Jan, mi vizitis la ponton, kiu portas la nomon 'Ponto Esperanto'. Vespere mi kaj koreaj esperantistoj estis invititaj de s-ro Michal Laski, por vespermanĝo; li partoprenis en la Seula UK en 2017. Krome, ankaŭ s-ino Helena Skonieczka, poetino, invitis kaj regalis nin en sia hejmo, Apartan dankon al ili ambaŭ!

La 1-an de aŭgusto, mi veturis trajne al Toruń, por renkonti tieajn esperantistojn. Sur la kajo de la stacio s-ro Janusz Pokrzywnicki kaj s-ino Grażyna Szubryczyńska bonvenigis nin kaj poste gastigis nin - kvar koreajn esperantistojn - familioj de s-inoj Teresa Nemere kaj Maria Pokrzywnicka. Mi kore dankas ilin.



Televida ĵurnalistino intervjuas Lee Junkee, dum la inaŭguro de la ekspozicio "Pollando miaokule"

La 2-an de aŭgusto, en Pedagogia Biblioteko en la urbocentro, okazis malferma ceremonio de la ekspozicio, kiu prezentas rezulton de la Internacia Pentraj-Konkurso "Pollando miaokule", iniciatita kaj anoncita internaciskale por infanoj, pere de Esperanto de la s-ino Grażyna Szubryczyńska - toruna esperantistino, pedagogo en la 35 toruna bazlernejo, kiu dum jaroj uzas Esperanton dum sia eduklaboro. Por la konkurso venis, laŭ ŝia konstato, pli ol 170 konkursaĵoj, el 6 landoj. En la ekspoziciejo oni povis prezenti nur parton de illi. Inter la premiitaj troviĝas ankaŭ kreaĵoj de du koreaj geknaboj, kiujn mi instigis por la enviciĝo. La inaŭguron ĉeestis ĉ. 30 personoj, inter ili direktorinoj de la menciita lernejo kaj de Pedagogia Biblioteko. Ĉeestis ankaŭ torunaj esperantistoj.

En la ekspoziciejo mi estis intervjuata de la toruna televido. Espereble la ekspozicio daŭros, kiel jarevento, en Toruń, diskonigos la belan urbon kaj popularigos Esperanton. Mi kore dankas al ĉiuj samideanoj, kiuj engaĝiĝis por la sukcesa ekspozicio kunlabore kun la urbaj instancoj. Speciale mi dankas al la direktorino de la baza lernejo nr 35, kiu apogis la projekton, aranĝita pere de Esperanto, kaj helpis ĝin efektiviĝi.

Posttagmeze, danke al s-ino Maria Katarzyna Pokrzywnicka, la fakestrino de la Muzeo Etnografia en Toruń, ni havis raran ŝancon flari historion de la antikva Pollando. Koran dankon al Maria, kiu ĉiĉeronis en Esperanto. Krom tio, akompanate de ges-roj Janusz kaj Maria, mi vizitis

tri ZEO-ojn, kiuj troviĝas en Toruń: stratoj “Ludwika Zamenhofa”, “Antoniego Grabowskiego” kaj Memortabulo, omaĝe al Antoni Grabowski, surmure, antaŭ la kemia laborejo, en la mezlernejo n-ro 1.

La 3-an de aŭgusto, akompanate de s-inoj Teresa Nemere kaj Grażyna Szubryczyńska, ni vizitis plurajn historiajn lokojn kaj muzeon de Nikolao Koperniko, en kiu mi momente meditis pri la revolucia aserto de la astronomo kontraŭ tiama religia premado.

Posttagmeze, la filino de s-ino Teresa Nemere - Kinga Nemere Czachowska, profesia urba ĉiĉeronino, gvidis nin en Esperanto tra la bela urbo kun amuzaj rakontoj. Koran dankon, pro ŝia agrabla ĉiĉeronado. Poste, ni direktiĝis al la urbo Ciechocinek, kiu estas konata kiel kuracloko kun sala fonto. Mi aŭdis, ke oni kuracas sian malsanon helpe de “la sala promeno” ĉe la interesa konstruaĵo, kiu densigas la salakvon kaj vaporigas mineralaĵojn. Ankaŭ mi spertis tion, kaj kun la agrabla sento de la salfonta-efiko, polaj kaj koreaj esperantistoj, ni revenis al Toruń vespere. "Neatendite, posttagmeze venis al Toruń kvaropo da niaj samlandanoj, kiuj vizitis la sudan Pollandon.

Do, dum la sekvaj promenoj, ni kereoj jam estis okope!"

Dum tiu ĉi vojaĝo en du polaj urboj, mi konatiĝis kun sufiĉe da gesamideanoj, kiuj varme akceptis koreajn esperantistojn kaj ni, kiel fremdlandanoj, rimarkis, ke en Pollando troviĝas multaj vidindaj lokoj. Kun bonaj impresoj pri Pollando kaj pola Esperantujo ni, koreaj esperantistoj, forlasis Pollandon la 4-an de aŭgusto. Koran dankon al ĉiuj, kiuj amike multe helpis al ni, dum la restado en Pollando!

Toruń amike gastigas koreajn esperantistojn.



Grażyna Szubryczyńska,
instruistino de bazlernejo numero 35 en Toruń

Porinfana desegnokonkurso „Pollando miaokule” kun Esperanto kiel pontolingvo

Laborante kiel instruistino en infanĝardenoj en Toruń, jam dum jaroj mi strebis diversforme utiligi Esperanton, por proksimigi infanojn al diversaj landoj, diverslandaj kutimoj, k.t.p. Pere de Esperanto mi eĉ ligis oficialan kontakton kun la infanĝardeno en la ĉina edukcentro en.... Antaŭ unu jaro mi komencis labori en la infanĝardena parto de la bazlernejo numero 35, en Toruń. En ĝi mi ofte aŭdis pri internacia edukado. Mi decidis uzi la fakton kaj ankaŭ tie uzi Esperanton por edukado.



Okaze de 100-jara datreveno de liberiĝo de Pollando, mi sendis pere de interreto inviton al desegnokonkurso, je la temo “Pollando miaokule”. La tasko por infanoj, en du aĝkategorioj (ĝis la 7-a kaj ĝis 10-a jaro), estis esprimi propran imagon pri la temo per libera pentraĵ-tekniko kaj unufraza komento en sia nacia lingvo. Mi proponis, ke la lokaj esperantistoj traduku la frazon al Esperanto, por ke mi povu traduki al la pola lingvo.

Petante permeson organizi la konkurson, mi ekaŭdis de mia direktorino: „Fari ion novan – nepre. Sed per Esperanto? Ĉu ĝi daŭre

ekzistas?”. De tiu momento mi strebis agi pli forte. Rezulte de tio, nian lernejon atingis pli ol 170 desegnaĵoj el 6 landoj: Ĉinio, Serbio, Koreio, Hungario, Svislando kaj Brazilo. La direktorino fieris. Ŝi eĉ provis kompreni diversajn vortojn, demandis pri nia movado.

Ni pretigis por ĉiu partoprenanto de la konkurso dulingvan diplomon kaj, por kreintoj de la plej interesaj desegnaĵoj, - donacojn. Krome, diplomojn kaj dankmemoraĵojn ricevos ĉiu lernejo, el kiu venis la konkursaĵoj. Komisiono, elektante 3 la plej bonajn laboraĵojn, rimarkis, ke almenaŭ 50 ceteraj meritas por montri ilin al la vasta publiko. Post multaj streboj, mi sukcesis organizi espozicion en la toruna Pedagogia Biblioteko, kiu dum la pasintaj jaroj organizis 2 interesajn ekspoziciojn pri Esperanta literaturo, do volonte akceptis la novan proponon, kunligita kun Esperanto. Nia ekspozicio okazis sub la honora protekto de la toruna urbestro Michał Zaleski.



En la ekspoziciejo estas prezentitaj 52 desegnaĵoj kun komento en 3, supre menciitaj, lingvoj. La infankreaĵojn akompanas informoj pri Esperanto kaj kolekto de esperantlingvaj turistinformiloj pri vizitindaj lokoj en Pollando. Sur la retpaĝo de la biblioteko vi povas vidi la prezentadon

http://www.bptorun.edu.pl/index.php?akcja=&art_id=25&id_news=1076

La 2-an de aŭgusto 2019 okazis la solena malfermo de la ekspozicio. Bedaŭrinde, la urbestro ne povis partopreni en ĝi. Venis homoj el medio de la toruna edukado kaj kulturo, torunaj esperantistoj kaj, krome, “hazardaj” personoj, ĉar la aranĝo estis bone reklamita por torunanoj per per la urba kulturinformilo kaj interreto. Ĝoigis nin la partopreno de kvar koreaj geesperantistoj kaj, inter ili, ĉeesto de Jungkee Lee, estrarano de UEA kaj, kio estis speciale kortuŝa, avo de la partopretanto de la konkuro. Pro la partopreno de la gastoj, ĉiuj programeroj estis tradukitaj al Esperanto, fare de Teresa Nemere.

La direktorino de nia lernejo bonvenigis ĉiujn gastojn per kelkaj frazoj en Esperanto (!) kaj mi prezentis organizadon kaj atingojn de la konkurso. Sekvis parolado de Jungkee Lee, kiu gratulis al ni kaj proponis daŭrigon de nia kunlaboro. Sekve, la toruna poetino Małgorzata Musiałowska prezentis propran versaĵon pri la aranĝo kaj la 10-jara Staĉjo legis kelkajn komentojn de la partoprenantoj de la konkurso kaj - mi iliajn tradukojn. Estis tre kortuŝa momento kaj la knabo (do ankaŭ aŭtoroj de la vortoj) ricevis grandan aplaŭdon. Maria Pokrzynicka, la loka esperantistino kaj laborantino en la toruna Etnografia Muzeo anoncis baldaŭan starton de la nova kurso de Esperanto. La aranĝon filmis kaj intervjuis nin la loka televido, por ke vespere ni povu ekaperi en “Novaĵoj”. (kontrolu: http://www.tvtorun.net/movie/show?id=19415&fbclid=IwAR1OkGzKnIpe5-ej_fjb1wo8hvbv4Lr9j-aStRpg_ZZipX62RA194tzxDs)

Post la sukcesa aranĝo, mia direktorino petis min daŭrigi utiligon de Esperanto en nia lernejo. Mi elektis instruadon per la rekta metodo en mia grupo (4-jaruloj), krome mi daŭrigos korespondadon (mi jam trovis novan interesiĝintan lernejon) kun interŝanĝo de infanpentraĵoj je diversaj temoj.

Małgorzata Komarnicka

La 5-a Internacia Simpozio

Esperanto - disvolvado de homaj personecoj en la etapo
de la junaĝo kaj la tria aĝo – Eduksistemoj

La 24-an de majo 2019, en Wrocław, en la Buroo pri Kunlaboro kun Superaj Lernejoj - Akademia Centro de Wrocław, okazis dulingva, la 5-a Internacia Simpozio. Preparis ĝin kune: Eŭropa Centro de Interkultura

Edukado kaj Konfucea Instituto en Vroclava Universitato. Ĝia temo estis *Esperanto - disvolvado de homaj personecoj en la etapo de la junaĝo kaj la tria aĝo – Eduksistemoj*. Komence oni planis organizi la simpozion kune kun ĉinaj prelegantoj, sed, pro multaj kialoj, oni ne sukcesis realigi la planon. La organizantoj devis rapide trovi pozitivan solvon de tiu malfacila situacio des pli, ke la simpozion financis parte Vroclava Universitato. Ĉiuj, lastmomente invititaj prelegantoj, plenumis sian taskon altnivele.



La Honoraj Patronoj de la simpozio estis Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino (AIS), Tomasz Janoś - la direktoro de la Buroo pri Kunlaboro kun Superaj Lernejoj, prof. Bohdan Aniszczyk - la prezidanto de la Komisiono pri Edukado kaj Junularo, prof. dr hab. Adam Jezierski - LM Rektoro de la Vroclava Universitato.

La publikon de la Simpozio bonvenigis **Małgorzata Komarnicka**, la prezidantino de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado kaj **Monika Sochacka**, la direktorino de Buroo pri Kunlaboro kun Superaj Lernejoj. Laborlingvoj de la simpozio estis la pola kaj Esperanto kaj interpretis Małgosia Komarnicka.

Laŭvice prelegis Stefan MacGill - Universala Esperanto-Asocio (Novzelando - Hungario) - *Junaĝo kaj la Tria Aĝo en la E-movado*; Małgorzata Komarnicka - Eŭropa Centro de Interkultura Edukado / adjunkto de AIS San-Marino (Pollando) - *AIS - Altlernejo plejparte en*

Esperanto; prof. Christer Kiselman – Upsala Universitato (Svedio) - *Lingvo kaj scio*; Svetlana Pogorelaja – UTA Kijów (Ukraino) - *Aldoni ĝojon al la vivo - dank' al Esperanto*; Tomasz Janoś – Buroo pri Kunlaboro kun Superaj Lernejoj (Pollando) - *Vroclava Akademia Centro*; **Johann Pachter** (Germanio) - *Eduksistemo en Germanio en la jaro 2019*; dr Walentyna Wnuk – la konsilantino por Problemoj de Pliaĝuloj, ĉe la Prezidanto de Vroclavo (Pollando) - *Universitato de la Tria Aĝo kiel ekzemplo de efektivigo de la ideo de dumviva homa disvolvigo*.

Dank'al subteno de Vroclava Universitato, estis impone presita kaj bindita *Simpozia Kajero nr 5*, kiu entenas la simpoziajn prelegojn kaj fotojn kun biografioj de la prelegantoj.

Ĉijara simpozio estis ege fruktodona, ĉar ne nur la organizantoj ricevis monsubtenon de la neesperantista medio, sed neesperantistaj instancoj estis tre malfermaj, por daŭrigi la kunlaboron. Finante la 5-an Internacian Simpozion, neesperantistoj substrekis, ke por ili estis granda plezuro aŭskulti la prelegojn en la lingvo Esperanto, kiu scipovas transdoni ĉiujn niuancojn de la homa penso. La konsilantino por Problemoj de Pliaĝuloj, ĉe la Prezidanto de Vroclavo, entuziasme konstatis, ke jam de aŭtune ĉi-jare oni devas enkonduki Esperanton en ĉiun Universitaton de La Tria Aĝo en Vroclavo.

En la urbo Vroclavo estas 10 Universitatoj de La Tria Aĝo. Ni do ne povas plenumi ĉi tiun taskon, ĉar mankas bone edukitaj kaj diplomitaj instruistoj. En ĉi tiu situacio, malfacile estas kompreni, ke profesorino Ilona Koutny, gvidantino de tri-jaraj postdiplomaj, interlingvistikaj studoj ĉe Adam Mickiewicz Universitato en Poznań, ĉiujare baraktas kun manko de studentoj. Ŝi eĉ havas problemojn gajni studentojn por la unujara instruista trejnado.

Feliĉe, estis eldonita bona Esperanto-lernolibro „Sukceso per Esperanto” de Edward Malewicz. Nun ni devas strebi plimultiigi en nia movado altedukitajn instruistojn - ja ni devas ŝanĝi la bildon de Esperanto, kiu, bedaŭrinde, ofte estas rigardata, kiel malmoderna, eĉ arkaika kreaĵo.



JES en Karłów

JES – *Junulara E-Semajno* – estas jarŝanĝa renkontiĝo, unu el la plej grandaj junularaj Esperanto-aranĝoj. Ĉiujare, dum unu plena semajno, kutime en Germanio aŭ Pollando. Ĉi-jare ĝi okazas jam la 11-an fojon!

Grava informo! Fine de la pasinta JES en Storkow (Germanio), ni informis vin, ke la sekva okazos en Głuchołazy en Pollando.

Pro diversaj kialoj, ni devis tamen ŝanĝi la lokon – **la 11-a JES okazos en la vilaĝo Karłów** (ĉeĥe Karlov, germane Karlsberg), **apud Kudovo** (Kudowa-Zdrój/Chudoba).

Memoru kaj informu viajn amikojn pri la ŝanĝo, por ke ni ĉiuj certe renkontiĝu en la ĝusta loko!

Sed ne tristu! La nova loko ŝajnas eĉ pli bona – ĝi troviĝas en montaro, do ĉi-jare ni ĝuos tute alian, unikan, freŝan etoson. Kiel ĉiam ni garantias agrablan tempon, dum kiu vi renkontiĝos kun aliaj esperantistoj, ekscios pri aliaj kulturoj kaj travivos kune la novjaran feston.

Raportoj, rakontoj

Revuo "Esperanto"

Diplomo pri Elstara Agado

Dum la Solena Fermo de la 104-a Universala Kongreso en Lahtio estis anoncitaj la nomoj de 12 ricevantoj de Diplomo pri Elstara Agado kaj de Diplomo pri Elstara Arta Agado. Tiuj diplomoj estas aljuĝataj de la Estraro de UEA ekde la jaro 2007.

Diplomo pri Elstara Agado:

Wolfram Diestel (Germanio) - pro la elstara agado kiel fondinto kaj prizorganto de la Reta Vortaro (ReVo), kiu festas ĉi-jare sian 20-jariĝon.

Andrej Grigorjevskij (Rusio) - pro la longdaŭra, elstara agado kiel volontula prizorganto kaj retestro de la retejo de UEA.

Vasil Kadifeli (Turkio) - pro la elstara agado kiel instruisto, tradukanto kaj redaktoro de la turka revuo Turka Stelo. Li estas unu el la motoroj de la Mezorianta kaj Nordafrika Komisiono de UEA (MONA), regule funkcianta. Li aperigas proksimume unu komunikon semajne, jam de almenaŭ du jaroj. Li aperigas ankaŭ valorajn literaturajn verkojn el la araba kaj turka kulturoj.

Reza Kheir-khah (Tajvano) - pro la longtempa, elstara agado kiel instruisto de Esperanto por la tajvana movado kaj eldonisto de la revuo 'Formoza Folio'.

Małgorzata Komarnicka (Pollando) - pro la elstara agado kiel organizanto de kulturaj kaj klerigaj aranĝoj en Pollando, kiel la Interkultura Majrendevuo, la Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj.

Lu Wunsch-Rolshoven (Germanio) - pro la elstara agado kiel informanto pri Esperanto. Li estas la fondinto kaj la estro de Esperanto Land kaj prizorgas la gazetarajn rilatojn de Germana Esperanto-Asocio.

Privas Tchikpe (Benino) - pro la elstara agado kiel prezidanto de la asocio "Scio Sen Bariloj" kaj la provoj mediacii en konfliktaĵoj kaj kunlaborigi ĉiujn beninajn aktivulojn por Esperanto.

Bernhard Tuidler (Aŭstrio), bibliotekisto - pro la elstara agado kiel prizorganto de la Kolekto por Planlingvoj ĉe la Aŭstra Nacia Biblioteko kaj Esperanto-Muzeo en Vieno.

Wei Yubin (Jado) (Ĉinio) - pro la elstara agado kiel direktoro de elementa lernejo kun 7 Esperanto-instruistoj. Li enkondukis Esperanton en sian lernejon antaŭ 10 jaroj; ĝis nun pli ol 600 lernantoj lernis Esperanton; ĉiujare oni okazigas Zamenhof-feston en la lernejo.

Diplomo pri Elstara Arta Agado:

Jo Haazen (Rusio) - pro la senlaca agado arta kaj movada, inkluzive de la orkestra realigo de "La Espero".

Miroslav Malovec (Ĉeĥio)



- pro la elstara kontribuo al la muzika Esperanto-kulturo, per la traduko de la opero Sternenhoch (teksto de Ivan Acher, laŭ la ekspresionisma romano de la ĉeĥa aŭtoro Vladislav Klíma), surscenigita de la Nacia Teatro en Prago.

Antonio de Salvo (Italio) - pro la elstara kontribuo al la literatura Esperanto-kulturo. Li tre regule publikigas sur retaj listoj informojn pri italaj verkistoj kaj pri famaj aŭ konindaj homoj. Li kreis kaj prizorgas ampleksan blogon en la bitoteko de Itala Esperanto-Federacio (www.bitoteko.it).

Robert Kamiński

Koresponda servo universala

Karaj samideanoj, ĉu vi koresponas kun aliaj esperantistoj? Vi, verŝajne, respondos, ke tio jam ne estas moda, aŭ: ni ne havas tempon, oni korespondis en pasinteco ktp. Tamen, vi povas aŭ eĉ devas korespondi kaj tiamaniere plibonigi vian lingvonivelon. Sufiĉas havi komputilon kaj viziti retejon “Koresponda Servo Universala” <http://esperanto-plus.ru/koresponda-servo/>, kie vi trovos centojn da homoj el ĉiuj kontinentoj, kiuj volas korespondi esperantlingve.



Mi volas korespondi
klaku por fari vian anoncon

Про отаџина и различия между похожими вещами

География и путешествия

100

0-100 korespondantoj

200

100-200 korespondantoj

300

200-300 korespondantoj

400

300-400 korespondantoj

500

400-500 korespondantoj

informu viajn amikojn en la sociaj retoj!



Lando

Nomo Familinomo (jaro de naskiĝo)
[s-ro / s-ino]

Teksto de la anonco

ret@dreso

foto
klaku por
grandigi

Ferenc Sarkozi (1988)

Hungario

Mia nomo estas Ferenc. Mi loĝas en Hungario, en malgranda vilaĝo kun mia familio. Mi nun lernas Esperanton. Mi estas inĝeniero. Mi ŝatas korespondi. Skribu al mi!



Live Science, <https://dzienniknaukowy.pl/>

Tradukis Robert Kamiński


Fizikistoj malkovris tiel fortan reagon, ke ili timis malkaŝi ĝin

Fizikistoj ĉe CERN (Eŭropa Organizo por Nuklea Esploro) raportis pri la malkovro de kvarkreago, kiu povas produkti plurfoje pli da energio ol dum hidrogena eksplodo. Esploristoj konsideris, ĉu pro sekureco ili ne konservu ĉi tiun informon nur al si.

Kvarkoj estas la plej malgrandaj elementaj partikloj, komponantoj de materio. La tuta mondo, kiu ĉirkaŭas nin, estas konstruita el ili. Kvarkoj kuniĝas laŭ diversaj manieroj, kreante malsamajn specojn de partikloj. Estas ses kvarkoj kaj ili povas esti malpezaj aŭ pezaj. La du bazaj kvarkoj estas supra kaj malsupra. La aliaj kvar estas pli pezaj kaj maldaŭraj. Ili estas kvarkoj: stranga, ĉarma, malalta (nomata ankaŭ bela) kaj alta (nomata vera).

Esploristoj ĉe CERN malkovris, ke la malaltaj kvarkoj teorie povas kunliĝi, produktante ĉirkaŭ okoble pli da energio ol la eksplodo de la plej forta bombo, konata de la homaro - la hidrogena bombo. La fizikistoj Marek Karliner, el la Universitato de Tel-Avivo, kaj Jonathan Rosner, el la Universitato de Ĉikago, meditis, ĉu sekretigi ĉi tiun malkovron. Fine, la publikaĵo aperis en la revuo *Nature*.

La energio, je la mezurita en mega-Esploristoj kalkulis la liberigota pro kombino Tio estas 138 MeV, deŭterio kaj tritio - la hidrogena bombo "Ivy Enewetak-atolo en 1952, homa arsenalo, havas 17,6 MeV.



subatoma nivelo, estas elektron-voltoj (MeV). kvanton da energio, de du malaltaj kvarkoj. dum la fuzio de brulaĵo de la unua Mike", krevigita sur la ĝis nun la plej forta en la

Karlin kaj Rosner pripensis, ĉu eblas konstrui kvarkbombon. Ili ankaŭ petis opinion de aliaj kolegoj kaj konkludis, ke tia ŝarĝo nuntempe ne estas konstruebla.

La hidrogena bombo konsumas sian enorman potencon de la ĉena reakcio - grandega kvanto da fuzio de deŭterio kaj tritio, en mallonga tempo. Oni devas ankaŭ havi la necesan fuelan provizon, por tia ĉena reago. Fizikistoj konstatis, ke tia ĉena reago ne eblus en la kazo de malaltaj kvarkoj, precipe pro tio, ke ili disfalas post unu pikosekundo (unu biliono de sekundo). La rezulto de la disfalo estas du kvarkoj supraj, de kiuj oni ne povas akiri tian grandan energion.

Tiaj kvarkoj povas esti akiritaj ĉe la Granda Hadronokoligilo (LHC) ĉe CERN. Tamen, nuntempe ni ne konas la teknologion, kiu ebligus ilin konservi. Krome, la kvantoj, akireblaj ĉe CERN, ne sufiĉus, por produkti la ŝarĝon. Tamen, en la estonteco, la teknologio povas permesi plenumi la kondiĉojn, por la produktado de tia fuelo.

"Mi devas konfesi, ke kiam mi unue ekkomprenis, ke tia reago eblas, mi estis terurigita. Se mi, eĉ dum unu mallonga momento, agnoskus, ke ĉi tiu eltrovo havos militajn aplikojn, mi ne publikigus ĝin - diris Karliner dum la intervjuo kun la informservo „Live Science” (Viva Scienco). La esploristo aldonis, ke la eltrovo estas ekscita, ĉar ĝi estas la unua teoria pruvo, ke estas ebla tiuspeca kunligado de la subatomaj partikloj, kiu liberigas energion.

GeekWeek.pl

Tradukis *Robert Kamiński*

Sukcesa flugo de la potenca raketo *Falcon Heavy* (FH) de *SpaceX*

La 12-an de aprilo 2019, okazis kelkfoje prokrastita, starto de la plej potenca raketo, nuntempe uzata en la privata spaca inustrio kun la misio *Arabsat 6A*.

La dua flugo en historio kaj la unua kun komerca misio okazis, helpe de du solidaj flankaj raketoj, en la plej nova versio de la raketo *Bloko 5*. Ili estas plene reakiritaj, kio finfine influos gravan redukton de kostoj de la estontaj spacaj misioj, efektivigataj de *SpaceX*.

La inĝenieroj de la firmao de Elon Musk, kiel dum la unua flugo de ĉi tiu raketo, preparis kaj perfekte efektivigis la lanĉon de la raketo de la lanĉa platformo LC-39A, sur Kabo Canaveral kaj alteriĝon de flankaj raketoj

Landing Zone 1 kaj Landing Zone 2, meze sur la aŭtonoma barĝo, nomata *OCISLY*, kiu navigis 1000 kilometrojn de la bordo en la Atlantika Oceano.



La misio de la Falcon Heavy raketo estis lanĉi geostacionan orbiton, komunikada satelito pezanta ĉirkaŭ 6 tunojn nomata *Arabsat 6A*, kiu estis konstruita de *Lockheed Martin* por la saudi-arabia telekomunika kompanio. La satelito servos al klientojn dum almenaŭ 15 jaroj.

La statika testo de *FH* okazis fine de marto, sed problemoj kun la raketo mem kaj la malfavoraj vetercirkonstancoj kaŭzis, ke la lanĉo estis prokrastita plurfoje, pro la timo pri malsukcesa misio. Finfine, tamen, ĉio iris bone. La dua, sukcesa misio de *Falcon Heavy*, kaj la unua komerca misio malfermis la vojon, por regula lanĉo de ŝarĝoj, sur la orbiton de la Tero kaj nun permesos al *SpaceX* subskribi lukrajn kontraktojn kun la registaro por plenumi misiojn, ligitaj kun nacia sekureco.



Surterigo de reuzebla raketo dum dua starto de FH

Ni observu la firmaon de Elon Musk kaj ĝiajn talentajn inĝenierojn, ĉar ju pli da sukcesoj ili havos sur sia konto kaj konvinkos klientojn, des pli rapide oni trovos la monon, por flugoj al la Luno kaj Marso.

Rigardu ĉi tiun belan flugon en la filmo.

https://www.youtube.com/watch?time_continue=32&v=Qh4g0zWjBu8

Vizitindaj lokoj

Robert Kamiński

La unua en Pollando observa turo, en branĉaro de arboj
- unika ligna konstruaĵo en Krynica-Zdrój.

Eksterordinara ligna konstruaĵo de la Turo, 49,5 metrojn alta, situas ĉe la supro de la ski-stacidomo Słotwiny Arena (896m super marnvelo), en la arbaroj de la montĉeno Jaworzyna Krynicka. Al supro de la Turo kondukas speciale konstruita "ligna pado", subtenata per 18 apogturoj kaj 87 fostoj.



Dum la projektado de la vojo, unuafoje en Eŭropo, en du lokoj oni aplikis sistemon de la etaĝa vojo. Danke al uzo de la speciala akacia ligno, la inĝenieroj kreis solidan konstruaĵon, kiu plenumas sekurecajn normojn kaj garantias estetikajn valorojn. La situo de la itinero en la branĉaro de arboj, sendube pligrandigas la ĝuon, ligitan kun admirado de la pejzaĝo. La tuta

vojo estas longa 1030 metrojn. Sur la itinero, danke al la specialaj edukaj instalaĵoj, vizitantoj povas pli bone ekkoni la ĉirkaŭan naturon kaj historion de la regiono.


Plia allogaĵo, precipe por infanoj, estas la 60-metra glitejo. La turon oni povas atingi per la moderna, 6-seĝa telfero Doppelmayr, ekipita per ventoŝirmiloj, aŭ promenade laŭ la pavimita kaj pitoreska vojo.

La konstruaĵo estas kreita en la bela arbarokomplekso, inter belegaj kaj majestaj arboj, kiel fagoj, abioj kaj piceoj. Ĉi tiu unika projekto estas la unua tiuspeca en Pollando, kaj povas fariĝi unu el la ĉefaj vidindaĵoj de la regiono. Ĝi estas la plej alta ligna observa turo, projektita kaj realigita de polaj konstruistoj, arkitektoj kaj ĉarpentistoj.

Kiom ni pagos por la atrakcio?

La eniro al la panorama turo en Krynica-Zdrój kostas 39 zlotojn; por la rabatita -bileto vi devas pagi 32 zlotojn. Unu glito kostas 9 zlotojn. Familiaj biletoj 2 + 2 kun eniro kaj eliro per teleferejo kostas 199zł, kaj en la kazo 1 + 2 - 179 zł.

Por unu suprenveturo per telfero oni devas pagi 15 aŭ 18 zł, same por malsuprenveno; la ambaŭflanka veturo kostas 21 kaj 29 zł. Infanoj ĝis la 3-a jaro uzas la atrakciaĵojn senpage. La turo estas malfermita ĉiutage de la 9-a ĝis la 19-a horo.



Lidia Żychlinska, Filino

Memorinda Tadeusz Kopec (1928-2019) Eksterordinare bona Homo, esperantisto.

Li naskiĝis la 1-an de novembro 1928 en Varsovio; tie li ankaŭ pasigis sian infanaĝon kaj malfacilajn jarojn de la dua mondmilito.

Ekonomikisto laŭ profesio, li estis pasia entuziasmulo de la lingvo Esperanto, kiun li propagandis inter familio, geamikoj kaj gekonatoj. La Patro kredis, ke Esperanto estas ne nur lingvo, sed ankaŭ ideo, kiu ligas homojn en la mondo.

Li estis aktiva membro de Pola Esperanto-Asocio, Filio en Łódź kaj partoprenanto de multaj Esperanto-kongresoj kaj kunvenoj, amika al ĉiuj, kiujn li renkontis sur sia vivvojo. Ofte li korespondis kun esperantistoj el diversaj eŭropaj landoj, el Sudameriko kaj Afriko,

Aparte sentema li estis je la malriĉeco, reganta en afrikaj landoj. Li volonte organizis diversajn formojn de helpo por afrikanoj. Ĉiam amika, fidinda kaj modesta, li estis ankaŭ sentema kaj adoranta belecon de la naturo, interesiĝis pri herb-kuracado kaj abelbredado.

La Patro amis muzikon, senĉese ĝin aŭskultis; muziko akompanis lin ĝis la lastaj vivmomentoj.

Li forpasis la 31-an de julio 2019, ĉirkaŭita de la plej proksima familio kaj etoso de amo. En la lastaj momentoj sonis por li lia amata balado de Bułat Okudźawa.

La Patro ĉiam restos en niaj koroj.

Tadeusz Kopec dum kristnaska kunveno
en Esperanto-klubo en Łódź



Mi memoras, ke Tadeo, dum klubaj renkontiĝoj, prezentis al ni poezion kaj muzikon. Ni kune diskutis, kiamaniere helpi al afrikaj esperantistoj. Li iniciatis komunan, kluban monhelpon, por esperantistoj en Kongolando. Ofte li sendis donace al amikoj Esperantajn librojn. Ĉiuj klubanoj gustumis liajn herbajn kuraclikvorojn. Ni ricevadis de li ujojn de la bona mielo, kiun produktis lia konato abelbredisto.

La lastan jaron ni interparolis nur telefone, ĉar la malbona sanstato malpermesis al Tadeo veni al Kulturdomo kaj partopreni en niaj, esperantistaj kunvenoj. Lia gaja animo ĉiam restos en nia memoro

Lingvosciencia angulo

Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko

„La” ĉe propraj nomoj – Aliaj difinoj - 1

Krom la difina artikolo *la*, estas difiniloj ankaŭ la posedaj pronomoj, la tabelvortoj je U, A kaj ES, la vorteto *ambaŭ* kaj duondifina *unu*. Kiam ĉeestas la vorteto *ĉi*, oni iafoje subkomprenas la difinilon *tiu*. Tiam *ĉi* kvazaŭ mem fariĝas difinilo.

Posedaj pronomoj «

Posedaj pronomoj estas *mia, nia, via, lia, ŝia, ĝia, ilia, onia* kaj *sia* (kaj ankaŭ *cia*).

Kiam poseda pronomo aperas kiel priskribo de O-vorto, ĝi kalkuliĝas kiel difinilo. Plej ofte la efektiva senco estas difina (la alparolato scias, pri kiu temas). Sed oni tamen ne aldonas *la*. Se oni anstataŭigas la posedan pronomon per subfrazo, kiu esprimas la posedanton, oni plej ofte devas aldoni *la*:

- **Mia domo estas granda.** = *La domo, kiu apartenas al mi, estas granda.*
- **Viaj ŝtrumpoj estas malpuraj.** = *La ŝtrumpoj, kiuj apartenas al vi, estas malpuraj.*
- **Li detruis sian sanon.** = *Li detruis la sanon, kiun li havis.*

Tamen iafoje, precipe kiam frazparto kun poseda pronomo aperas kiel perverba priskribo, la efektiva senco povas esti nedifina:

- *Li estas **mia onklo**.* Li estas onklo de mi. Eble mi havas ankoraŭ aliajn onklojn.

- *Tion mi diras al vi, ĉar vi estas **mia samlandano**.* = ...vi estas samlandano de mi La celita senco estas nedifina.

- *Se iu intence mortigis **sian proksimulon** per ruzo, tiam eĉ de Mia altaro forprenu lin, ke li mortu.* Nedifina senco.

Se temas pri certa individuo, kiu tamen estas nekonata de la alparolato, oni povas por klareco aldoni la vorton *unu*: **Unu mia amiko estas advokato**. **Unu el miaj amikoj estas advokato**. Oni ankaŭ povas uzi *de*-esprimon kun aŭ sen *unu*: **Amiko de mi estas advokato**. **Unu amiko de mi estas advokato**.

Luj provas uzi posedan pronomon kiel postpriskribon por montri nedifinan sencon: **Amiko mia estas advokato**. Tia uzo tamen ne estas ĝenerale akceptita, kaj ne ĉiuj komprenas, ke la nekutima vortordo celas montri nedifinan sencon. Normale oni do devas uzi iun el la pli klaraj esprimomanieroj montritaj ĉi-antaŭe.

Kiam poseda pronomo aperas sola (sen posta O-vorto aŭ A-vorto), ĝi ne estas difinilo. Por klare esprimi, ke oni celas difinitecon oni tiam ofte aldonas *la*, sed tio ne estas deviga:

- *Tiu ĉi libro estas **mia**.* Ĝi estas unu el miaj libroj – nedifina senco.

- *Tiu ĉi libro estas **la mia**.* Ĝi estas tiu konata libro, kiu apartenas al mi – difina senco.

- *Unu donis al **sia florejo** la formon de baleno; alia trovis pli bone, ke **sia florejo** similas je virineto de maro; sed la plej juna donis al **la sia** formon rondan, kiel la suno. La *sia* = *sia florejo*. Ĉiuj tri florejoj estas difinitaj. La unuaj du estas sufiĉe difinitaj per *sia* kaj *ŝia*, sed la tria estas menciita per sola poseda pronomo (sen la O-vorto *florejo*), kaj bezonas *la*.*

- *Nu, certe mi legis **la vian**, kiel bone skribita! La *vian* = *vian verkon* = *la verkon*, kiun vi faris.*

- *Via pano estas malpli freŝa, ol **mia**.* Jen Fundamenta ekzemplo, en kiu ne aperas *la* antaŭ *mia*, kvankam la senco estas *la pano, kiu apartenas al mi*. Oni tute rajtas diri *ol la mia* por plia klareco, sed tio ne estas deviga.

Lafoje en poezio k.s. oni ne sekvas la normalajn regulojn por posedaj pronomoj. Tian uzon oni (normale) ne imitu en ordinara lingvaĵo:

- *Patro **nia**, kiu estas en la ĉielo.* = *Nia patro...*

- *Ho, la profeta **mia** antaŭŝento!* = *Ho, mia profeta antaŭŝento!*

- *Eraras for la penso **mia**.* = *Eraras for mia penso.*

- *Kaj nun, Laerto, al l' afero **via**!* = ... *al via afero!*

- *Mieno **lia** montris pli suferon, sed ne koleron.* = *Lia mieno...*

Robert Kamiński

Polaj noveloj - legado de la „Nacia legado” - 2019

La kampanjon *Nacia Legado* organizas Prezidento de Pollando, ekde 2012. Ĝi estis komencita per la komuna legado de la fama epopeo de Adam Mickiewicz *Sinjoro Tadeo*. Dum la ĉi-jara kampanjo, la prezidenta paro proponis por la legado ok polajn novelojn: 1. „Bona sinjorino” – de Eliza Orzeszkowa, 2. „Fumo” de Maria Konopnicka, 3. „La Gurdo” – de Bolesław Prus, 4. „Mia patro aliĝas al la fajrobrigadistoj” – de Bruno Schulz, 5. „Plugado” – de Władysław Stanisław Reymont, 6. „Disbekos nin korvoj, kornikoj...” – de Stefan Żeromski, 7. „La Saĥemo” – de Henryk Sienkiewicz, 8. „Sawa” (el la ciklo: Memoraĵoj de Soplica) – de Henryk Rzewuski.

La prezidento Andrzej Duda kaj lia edzino elektis ilin el inter pli ol cent titoloj, senditaj al la Kancelario de la Prezidento.

Esperantistoj jam kelkfoje aliĝis al la kompanjo, proponante laŭtlegi la elektitajn verkojn en Esperanto. En la jaro 2012, kelkloke en Pollando, sonis versoj de „*Sinjoro Tadeo*”, genie tradukitaj de Antoni Grabowski, jam en la jaro 1918. Por la Nacia Legado en 2017, Lidia Ligęza tradukis fragmentojn de la fama verko de Stanisław Wyspiański “Geedziĝfesto” kaj, por 2017, Tomasz Chmielik esperantigis la romanon de Stefan Żeromski „*Antaŭprintempo*”. Tiu ĉi verko estis laŭtlegita sur ĉiuj kontinentoj - en preskaŭ 3000 lokoj en la mondo, inkluzive 134 ekster Pollando, en 33 landoj, eĉ en Antarkto.

...”Ni kunvenu sabate, la 7-an de septembro 2019, por malkovri la belecon kaj aktualecon de polaj noveloj. Mi estas konvinkita, ke ilia riĉeco permesos al ĉiuj aliĝi kaj kunkrei nian kampanjon, kiu, popularigante legadon, pruvas belecon de la pola literaturo...” - skribis la prezidento Andrzej Duda en speciala letero.

Ĉijare esperantistoj denove aliĝas al la Nacia Legado. Inter la elektitaj noveloj du jam estas tradukitaj al Esperanto (“Bona sinjorino” de Eliza Orzeszkowa, - tradukis Kazimierz Bein kaj “Fumo” de Maria Konopnicka - tradukis Jerzy Grumm) Tomasz Chmielik, Lidia Ligęza kaj Przemysław Wierzbowski tradukis la ceterajn elektaĵojn. Ĉiuj noveloj, elektitaj de la prezidento, estos publikigitaj esperantlingve en Bjalistoko, antaŭ la 7-a de

septembro, danke al la subteno de Bjalistoka Esperanto Societo, Urboficejo de Bjalistoko, Eldonejo Libromondo, kaj Dokumenta Esperanto-Centro Ĝurdevac. La 7-an de septembro ni kunvenu en Zamenhof-Centro en Bjalistoko, por komune legi la novelojn esperantlingve kaj ricevi noveldonitan novelaron. Organizantoj de la kunveno pretigis multmedian prezentadon, literaturan kvizon kaj specialan porokazan stampon.

Mi petas esperantistojn en aliaj urboj - aliĝu al la ĉijara *Nacia Legado*. Tekstojn de la tradukitaj noveloj, en elektronika formo, ni povas sendi al ĉiuj, kiuj volus partopreni en la kampanjo.

Maria Konopnicka
Tradukis *Jerzy Grum*

„Fumo” (fragmento)

„Kiomfoje ŝi rigardis tra la fenestro de sia loĝejeto, tiomfoje ŝi povis rimarki, kiel el la granda kamentubo de la fabriko eliras griza kolono. Ofte ŝi intence forprenas de sia laboraĵo la maljunulinajn okulojn, por ĵeti al la fabriko almenaŭ unu rigardon. En tiu rigardo estis ia stranga beato kaj dorloteco. Homoj preteris rapidante en diversajn flankojn, kaj preskaŭ neniu turnis sian atenton al la kamentubo kaj neniu rimarkis speciale la grizbluan strion de fumo. Nur por ŝi tiu ĉi fumo havis apartan signifon, kiu kvazaŭ parolis, ŝi perfekte ĝin komprenis, ĝi estis por ŝi kvazaŭ viva estaĵo.

Kiam en la frumatena, opala krepusko diverskoloriĝis la farboj de la aŭroro, jam vidiĝis dikegaj kolonoj da fumo, kiuj disportis akran kaj tranĉan odoron de fulgo. Tiam ŝi sciis, ke tie staras ŝia Marĉjo ĉe la fajro kaj en la kaldronejo brulheligas la flamon, ŝi sciis, ke tie staras li, ŝia filo, alta, svelta, vestita en malhelblua tola bluzo, kun leda zono ĉirkaŭ la korpo, kun ronda ĉapeto sur la helaj haroj de la kapo, iom malsupre disbutonumita kolumo.

- Ho, ho! - ŝi paroletis tiam bonhumorete - Marĉjo laboras.

Efektive, li laboris kun fervoro de novulo, li ŝutis korbon post korbo da karbo en la fajron, farante sian laboron kaj samtempe ankaŭ tiun de la fajrigisto, fiera pri sia nova plialtranga okupo de kaldronisto. Tiam en lia koro ankaŭ eksplodis abundo da kantoj diversaj, kiuj plenigis la kalkdronejon de mateno ĝis nokto.

Post nelonge tamen, la nigraj bulvolvoj da fumo blankiĝis, maldensiĝis, fariĝis pli malpezaj kaj tra serena lazuro eliĝis supren en formo de malpeza rekta kolono.

Tiu vidajo enverŝis en la koron de la vidvino ĝojon kaj serenon.

- Ĉio bone... - Si flustris - ĉio estas bone; al Dio Superulo dankon!

Kaŝ ŝi kuretis *en* la malriĉa ĉambreto laboreme, ordigis sian liton kaj la tabulliton de sia filo, purigis per malnova betula balailo kaj bruligis fajron en la kameneto por la tagmeza manĝo.

Tiam, rekte vid-al-vide al la granda fabrika kamentubo. ankaŭ tie ĉi, el super la tegmento de la mansardo, kie loĝis la vidvino, suprenleviĝis beltufe maldika, blueta fadenareto da fumo, fadenareto tiel mizera, kiel la spiro de maljunulaj brustoj.

La juna kaldronisto ĉiam rimarkis tiun fadenareton. Kaj ne nur rimarkis, sed ridetis al ĝi. Li bone scias, ke tie. ĉe la kameneto, staras lia patrino, vestita per blanka kufo sur la kapo, kolora kaftano kaj rozkolora antaŭtuko, eta, velka. ĝiba, preparante por li iun bonan barĉon aŭ perfektan grisupon. Ŝajnis eĉ al li iafoje. ke li evidente sentas la bongustan odoron de tiuj raguoj.

Kun duobla entuziasmo tiam li ĵetis sur la fajron denovan ŝovelilon da karbo, kaj dum la hejtisto gratis al si la kapon, li, starante per unu piedo sur la masonistaĵo, elaste kaj lerte por du aliaj laboregis.

Tiel de ambaŭ flankoj iris ĉielen tiuj du spiraĵoj: de la fabriko kaj de la mansardo, malaperante en la diafanaj lazuroj, eble eĉ kuniĝante kun ili

Tagmeze, la fumo fabrika maldensiĝis iel; la kolosaj pulmoj de la maŝinego malrapidigis iom sian laboron, la ellasitaj vaporoj trakudris multfoje la aeron per la akra kaj grinca fajfego kaj la knabo, kiel uragano, rapidis en la ĉambreton.

- Patrino, manĝon - li jam vokis el la sojlo kaj, ĵetante la kepon sur la tablon, li kuris al la kaĝo de merlo, pendanta en la fenestreto. La merlo, kiam ĝi nur ekvidis la knabon, eligis longdaŭran fajfon, similan al tiu de la fabriko, poste komencis siajn kutimajn kantojn, kiujn instruis al li Marĉjo. La knabo staris ĉela la kaĝo. enpoŝigis la manojn kaj fajfis. Ĝis la muroj tremis de tiu fajfado.

La patrino dume sternis sur la tablo la belan, flavan tukon, broditan per bluaj cervoj kaj starigis profundan fajencan vazon da grisupo, barĉon, aŭ pizan supon kun fumaĵita viando, aŭ ankaŭ farunbuletojn laŭ ŝia libervolo. Apud la vazo kuŝis sur la tablo pano grandbula, la ĉefa, fundamenta nutraĵo.

La panbulo malaperis post ne longe ĝis duono, kiam li nur apenaŭ alproksimiĝis al ĝi. Pecon post peco li tranĉis, saligis ĝin en pladeto kaj senĉese parolis:

- Bona pano, patrino!

- Bona. filĉjo - respondis ĉiufoje la vidvino. - Manĝu benbeate, manĝu. Je laŭdo al sinjoro Jesuo kaj Lia Patrino la plej Sankta...

La knabo ne atendis, ĝis oni lin petos, kaj kune kun la pano malaperis ankaŭ la enhavo de la plado.

- Bona barĉo, patrino - li tiam diris.

La patrino, post kelkaj minutoj, komencis plimalrapide manĝi. Kirlteis per la kulero en la telero, blovis sur ĝin, sed la barĉo ne malpliiĝis. Kiam do la knabo formanĝis, kion li havis antaŭ si, kaj per la mano deviŝis la lipharojn, ŝi demandis rapideme:

- Kaj eble filĉjo ankoraŭ...Al mi hodiaŭ iel ne tre...

Ŝi volis komprenigi al li, ke ne gustas, sed timis ofendi per evidenta mensogo Dion, ĉar la barĉo ja estis perfekta.

- Sed - diris la knabo - kial la patrino ne manĝas...

Ŝi antaŭstarigis al li rapide sian teleron. dirante:

- Manĝu, infano, manĝu! Je laŭdo al Sinjoro Jesuo..."



Saĝulaj pensoj

Andreo Bach

Kontraŭ senkonscia toksomanio

Kiam iu troe, potempe aŭ konstante uzas toksajn substancojn, tiam ni povas paroli pri toksomanio. Certe ĉiu el ni, pensemaj personoj, opinias, ke tia problemo ne koncernas nin, ĉar al tiaj damaĝaj substancoj ja apartenas ĉefe narkotaĵoj, kuracrimedoj, solviloj, alkoholaĵoj, kiujn ni ja minimume evitas. Ekzistas tamen, bedaŭrinde, pluraj substancoj, kiuj agas simile al tiuj venenigaj, kiujn ni konsumas eĉ ĉiutage kaj al kiuj ni tute senkonscie alkutimiĝis.

Mi ne listigos ilin nun. Ni okupiĝu iom pri alia procezo, pri sentoksigado. Al tiuspeca kuracado devus subiĝi narkotuloj, drinkemuloj kaj multaj aliaj personoj substancodependaj. Elimini toksinojn kaj ripari la kaŭzitajn de ili perturbojn el la organismo estas procezo longa kaj komplika. Estas la tasko por nia organismo, kiu estas inteligenta, sed ĝi bezonas iom da nia helpo.

Ekzistas tri bazaj, tre simplaj metodoj sentoksigi. Unu el ili povas esti la forigo de rafinitaj karbonhidratoj el la dieto. Unu studento gvidis apenaŭ unumonatan esploradon de grupo de homoj, kiuj decidis rezigni pri la konsumado i.a. de la blanka sukero, faruno neplengrajna, arte prilaborita bovina lakto. En la grupo de 14 personoj, post 30 tagoj de tiuspeca eliminado, la nivelo de kolesterolo en la sango tre malkreskis, ĉe unu persono eĉ je 170%! Simile pozitive ŝanĝiĝis aliaj kvin gravaj parametroj – morfologio (i.a. glukozo kaj insulino), trigliceridoj, urino, tiroidhormono (TSH) kaj bazaj hepatenzimoj. Unu ago – multaj profitoj. Intertempe t.n. rafinitaj produktoj ne havas vitaminojn kaj mikroelementojn, kiuj normale troviĝas ekz. en sukerbeto kaj plengrajna faruno, danke al kiu ni ricevas ĉiujn necesajn metabolaĵojn. Kaze de ilia manko por laŭregula metabolismo, nia organismo devas ĉerpi la mankantajn substancojn el siaj propraj provizejoj. Pro tio ekz, la konsumado de arte prilaborita lakto (UHT) malfortigas ostojn kaj malŝtopas intestojn.

Laŭvice, ni devas zorgi pri nia dormado. Tio ligiĝas kun la ritmo de hormonmastrumado, ĉefe kun la



kreado de melatonino (unu el plejfortaj antioksidantoj) kaj kreskohormono (kiu ĉe plenkreskuloj estas grava regenerilo, riparanta ĉelojn, difektitaj kaj markas la aliajn, neripareblajn, por ilin fine forigi). Gravas do enlitiĝi almenaŭ antaŭ la noktomezo kaj sufiĉe longe dormi. Tiam ni liveras al ni preskaŭ senpage substancojn, kiuj nin sanigas kaj plijunigas.

La tria metodo pri sentoksigado estas la profitado de saŭno. Lastatempe montriĝis, ke multe pli efike ŝvitigas nin saŭno, en kiu la fonto de varmo estas infraruĝaj lampoj. Tiun metodon, kun granda sukceso, aplikadas d-ro Wilson el Usono. Danke al lia saŭnado kaj kompletigado de

necesaj vitaminoj kaj mikroelementoj, li sukcesis kuraci plurajn personojn kun longedaŭraj malsanoj, inflamoj kaj kanceraj. Klasikaj sekaj kaj vaporaj saŭnoj funkcias en tre altaj temperaturoj, pro kio ties uzantoj ne povas tro longe elteni. Alie estas, se temas pri infraruĝaj lampoj, kiuj ebligas longan ŝvitadon ĉe sufiĉe malalta temperaturo. Dum la ŝvitado en saŭno multe pli intense eliras el ni multaj toksinoj ol kiam tio okazas sekve de la peno de sportistoj.

Sentoksikado okazas ankaŭ dum pisado, sed tiu saŭna estas pli intensa. Precipe la infraruĝa saŭnado sentoksigas, likvidas inflamstatojn kaj stimulas la ekeston de t.n. varm-ŝok-proteinoj (HSP). Ĉi-lastaj ŝanĝas la ĉelfunkciadon tiamaniere, ke ili malŝaltas normalan funkciadon de ĉeloj kaj ŝaltas iliajn regenerajn eblojn. Cele funkciigi la HSP-proteinojn, povas esti uzata ankaŭ tre malalta temperaturo. Sumigante, oni devas substreki la neceson ripozi. Tiusence gravas du procezoj – regenerado de biologiaj funkcioj de nia organismo kaj rekreado, t.e. reveno al la senco de nia vivo. Tiucele ni devus halti kaj pripensi, kiuj niaj viveventoj puŝas nin antaŭen kaj kiuj ne.

Poŝtkesto



BES, Literatura konkurso en Bjalistoko

Podlaĥia Libraro en Bjalistoko kaj Bjalistoka Esperanto-Societo anoncas la 9-an literaturan konkurson „Esperanto ligas homojn” por rakonto titolita „Mi estas civitano de la mondo”. La regularon vi trovos ĉe: www.espero.bialystok.pl. Dividu kun ni viajn opiniojn pri la mondo.



Adam Wilkus, Interesa artikolo pri lingvoj

Saluton! En la julia revuo "Wiedza i Życie" ("Scio kaj Vivo"), n-ro 7/2019, aperis interesa teksto "Ora epoko de kreinto de konstruita lingvo" ("Złota era kolangera"). La aŭtoro Kamil Nadolski mencias, interalie, pri la lingvo de koboldoj, kreita de Tolkien dum verkado de "La Hobito, aŭ tien kaj reen", surbaze de la finna, latina kaj greka, pri la klingona lingvo, kreita de Marc Okrand, por la kin-industria kompanio Paramount, kiun parolas la klingonoj, eksterteruloj, aperantaj en la filma kaj televida serio "Star Trek" (Stela Vojaĝo) kaj pri la plej populara en la mondo lingvo, kreita de Ludoviko Zamenhof, nome - Esperanto.

Oni mencias en la teksto pri ebleco lerni lingvojn artefaritajn pere de komputilaj programoj, en saĝtelefono, kiel ekzemple Duolingo ebliganta lerni Esperanton, aŭ la dotrakan.

Artefaritaj lingvoj aŭ, alivorte, konstruitaj lingvoj (anglalingve nomataj *conlang*) estas konceptitaj de unu aŭ kelkaj homoj, por povi logike rezoni (kiel en programlingvoj, kreitaj por transdoni komandojn al aparatoj, plejofte al komputiloj), por faciligi internacian komunikadon (kiel en Esperanto) aŭ nur, ĉar tio estas amuza (kiel la *navia* en la filmo „Avatar”, la *dotraka* en la filmo „Ludo de trono” aŭ la *klingona* en la „Stela Vojaĝo”.

Se vi ankaŭ interesiĝas pri lingvoj, mi rekomendas tiun tekston en la revuo, ĉar ĝi vere legindas.



www.facebook.com/Ret-Info/

Sveda ministro salutas la

kongreson en flua esperanto!

Surpriza evento de la ferma ceremonio en la ĵus finiĝinta Universala Kongreso en Lahti, estis la videa salutparolo de Amanda Lind, la sveda ministro pri kulturo kaj demokratio EN FLUA ESPERANTO!

Jen la teksto de ŝia alparolo:

Saluton estimataj kongresanoj!
Mi estas Amanda Lind, la sveda ministro pri kulturo, sporto, demokratio kaj naciaj minoritatoj. Kiel ano de Miljöpartiet, la sveda verda partio kaj de la tutmonda verda movado, la vivavanta naturo kaj floranta kulturo estas valoroj tre proksimaj al mia koro.

Elkoran bondeziron mi sendas al la Universala Kongreso. Renkontiĝoj kaj babilado inter homoj estas fundamento por vigla demokrata evoluo. Dankon al vi ĉiuj, en la Esperanta movado, pro viaj kontribuoj por instigi komunikadon trans lingvaj kaj naciaj limoj! Ni estu unu homaro sur ĉi unu tergloblo. Amike.



Popularaj Esperanto-aranĝoj en Pollando kaj en najbaraj landoj en 2019

26.07.- 04.08. 2019	Esperanta stando dum PolAndRock Festival en Kostrzyn ĉe la rivero Odra.	Renkontiĝo por memzorgantoj ene de la granda rokmuzikfestivalo Andi Münchow, rete: andim@gmx.li
27.07.- 05.08. 2019	Internacia Junulara kultura Interŝanĝo Pollando – Litovio. 15-a datreveno de membriĝo de ambaŭ landoj en EU	Centro de Interkultura Edukado en Nowy Sącz halinakomar@gmail.com
25.08. 2019	Montara Esperanta ekskurso de la monto Szyndzielnia ĝis la urbo Szczyrk apud Bielsko-Biala	Filio de Pola Esperanto-Asocio en Bielsko-Biala. Krystyna Zgud karad099@gmail.com
30.08.- 07.09. 2019	52-a Internacia Esperantista Feriado en Łądek Zdrój	Silezia Esperanto Asocio Teresa Pomorska, pomer@wp.pl
7.09.2019	Nacia Legado en Bjalistoko en Centro Ludoviko Zamenhof	Bjalistoka Esperanta Societo kontakt@espero.bialystok.pl
7.09.2019	Nacia Legado en Krakovo str. Rajska 1, 16:00 horo	Scienca Studenta Esperanto Rondo de la Jagelona Universitato kaj la Vojevodio Publika Biblioteko en Krakovo.
13-15. 09.2019	Esperanto Sur la Strando - 2019 Gdynia – Sopot, temo: "Najbaroj"	Triurba Esperantista Asocio TORENTO torentosopot@wp.pl https://sites.google.com/site/esperantowso-pocie/ FB – Esperanto Sopot.pl
14.09. 2019	Festo de la kvartalo Muranów PEA-stando dum sobĉiela festo Skvaro ĉe str. Andersa 13	Varsovia Filio de Pola Esperanto-Asocio alwamo@wp.pl
20-22. 09. 2019	35-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto „Arkones 2019” en Poznań	E-Senco Kultur-Socia Societo je la nomo Ludoviko Zamenhof en Poznań. http://www.arkones.org/eo/

29.09. 2019	„Tago de kreo-povo” PEA-stando en Ogród Saski en Varsovio 11:00-16:00	Varsovia Filio de Pola Esperanto-Asocio alwamo@wp.pl
11-13. 10.2019	43-aj Esperantistaj Preĝtagoj en Częstochowa	Pola sekcio de IKUE pomer@wp.pl
9-11. 11.2019	Esperantista renkontiĝo GRUPE - 23 en Gliwice	PEA, filio en Gliwice, stanislaw.mandrak@gmail.com aŭ: staman@ka.onet.pl
6-7. 12.2019	4-a Esperanta konkurso “Vortbeleo en Esperanto” en Wrocław	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado / informado.eo@gmail.com / Małgosia Komarnicka
13-15.12. 2019	20-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj en Bjalistoko	Bjalistoka Esperanta Societo kontakt@espero.bialystok.pl
27.12- 3.01 2020	11-a JES Junulara Esperanta Semajno en Kartów.	Pola Esperanto-Junularo www.pej.pl
1-8.08. 2020.	La 105-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) okazos en Montrealo (Kanado).	Universala Esperanto-Asocio uea.org
17-24.07 2021	La 106-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) okazos en Belfasto (Nord-Irlando).	Universala Esperanto-Asocio uea.org

Popularaj Esperanto-aranĝoj en najbaraj landoj

6-14.07. 2019	55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj - en Panevežys, Litovio	Litova Esperanto-Asocio, p.k. 167, LT-44002 Kaunas, Litovio. - retadreso: litova.ea@mail.lt
28.07- 04.08. 2019	75-a Internacia Junulara Kongreso, IJK en Liptovský Hrádok, Slovakio.	Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, TEJO. - Retadreso: ijk2019@tejo.org
17-20.10. 2019	Kongreso de Ĉeĥa Esperanto -Asocio en Brno, Ĉeĥio.	Estraro de ĈEA, náměstí Míru 1, 568 02 Svitavy, Ĉeĥio. - retadreso: cea@esperanto.cz

Roman Dobrzyński
**„DZIADEK KTÓRY JEST
WNUKIEM”**

Ludwik Krzysztof Zaleski-
Zamenhof Szkic biograficzny

Lingvo: pola


Eldonis: Pola Esperanto-Asocio –
Varsovio 2019

Projekto de kovrilo:

Robert Kamiński

ISBN 978-83-908340-7-8

Grandeco: A5, 15x21 cm



**„Słownik idiomów
polsko-esperancki
Vortaro de idiomaĵoj
pola-esperanta”**

Prilaboris: Stanisław Płachta

Eldonis: Esperanto-Societo
“Flamo” – Toruń 2018

ISBN 978-83-63333-49-2

Grandeco: A5, 15x21 cm



Forpasis

La 31-an de julio 1919, en Łódź forpasis multjara esperantisto, membro de Esperanto-klubo en Łódź, **Tadusz Kopec**. Adiaŭa ceremonio okazis la 8-an de aŭgusto je la 10-a, sur la tombejo “Stary” ĉe la str. Ogrodowa en Łódź.

En nomo de lodzaj esperantistoj kun bedaŭro informas,
Robert Kamiński

El fotogalerio de Andrzej Sochacki

Andrzej Sochacki

Programkonferenco en Maków Podhalański 4-6.12.1987

Fine de la kongresriĉa en Pollando jaro 1987, en Maków Podhalański okazis Esperanto-konferenco de Tutpollanda Komitato de Studentaj Sciencaj Rondo (Ogólnopolski Komitet *Studenckich Kół Esperanckich RN ZSP*).

La konferencon prezidis Jarosław Parzyszek. En la konferenco partoprenis ĉ. 40 personoj. Patroprenis en ĝi inter alie esperantistoj: Joanna Filipowicz, Dominika Dudzik, Andrzej Sochacki, Mirosław Śliwiński, Modest Błasiak, Jan Koszmaluk, Leszek Janczura, Marek Ostaszewski.





LETNIA SZKOŁA JĘZYKA I KULTURY POLSKIEJ
— DLA CUDZOZIEMCÓW —



→ { 5-25 lipca 2017 r. } ←

Uniwersytet w Białymstoku, Wydział Filologiczny
Szkoła Języka i Kultury Polskiej POLLANDO
Plac Uniwersytecki 1, Białystok



Ministerstwo Edukacji
i Sportu



Ministerstwo Edukacji
i Sportu



Wydział Filologiczny
Uniwersytet w Białymstoku



Wydział Filologiczny
Uniwersytet w Białymstoku



Wydział Filologiczny
Uniwersytet w Białymstoku

POLLANDO

SZKOŁA
JĘZYKA
I KULTURY
POLSKIEJ

"Pollando" - la nomo de la somera lernejo de pola lingvo kaj kulturo por eksterlandanoj en Bjalistoko. La nomo estas inspirita de la lingvo Esperanto. Tiun ĉi informon oni povas trovi sur la lerneja retpaĝo

La nomo "Viando" estas uzata dum multaj jaroj de pola firmao produktanta viandaĵojn. Ĉi tiu nomo ankaŭ devenas de Esperanto.



Komence de julio al Krakovo venis esperantaj gastoj - Tatiana Kolomijec el Ukrainio, Leszek Kordylewski el Usono, kaj Mikaelo Linecki el Israelo.

NIA FOTOGALERIO



Stando de Pola Esperanto-Asocio dum movada foiro en Lahti.